numero 100

aprilo 2011

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Enkonduko

Karaj IKEF-membroj kaj -simpatiantoj,

La centa numero de La Merkato verŝajne ankaŭ estas la lasta. Iam estis kvar numeroj jare, sed nun malfacilas plenigi eĉ unu numeron. Ĉar preskaŭ ĉiuj IKEF-membroj havas retaliron, povas sufiĉi la rubriko 'Novaĵoj' je www.ikef.org. Por membroj sen retaliro eblas unu aŭ du fojojn jare sendi kelkajn printitajn foliojn.

Nur en Ĉinio estis menciinda aktivado de IKEF dum la jaro 2010. Estus normale ke ankaŭ la sidejo de IKEF translokiĝus al tiu lando. Nia ĉina peranto, s-ro Wang, intencis kandidatiĝi kiel prezidanto dum la ĉijara UK en Kopenhago, sed li ne kapablos ĉeesti la kongreson. Li tamen venontjare estos en Hanojo kaj tie kandidatiĝos.

Roland Rotsaert, kasisto

## Enhavo

Mesaĝo de s-ro Wang . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2
Raporto pri la agado de IKEF dum 2010 - IKEF dum UK . . . . . . 3-4
Raporto pri IKEF-Ĉinio 2010 . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4-5
Bilanco - spezokonto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Likelemba - la afrika formo de tontino . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 7-8



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) [nur en aprilo en 2010] kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.
**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Roland Rotsaert, Marie Popelinplantsoen 3 bus 0402, 8000 Brugge, Belgio
retpoŝto: roland.rotsaert@gmail.com.

**Membrokotizo** provizore ne plu estas postulata.

**Kontoj** ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

**Interreto**: www.ikef.org (rekte: http://sites.google.com/site/ikefesperanto/)

## Mesaĝo de s-ro Wang (Ĉielismo)

Antaŭ ol verki ĉi tiun tekston, mi ricevis kuraĝigan mesaĝon de la brazila peranto kaj estrarano de IKEF, s-ro Silvio Mates, kaj ankaŭ okaze de aliaj korespondoj kaj renkontiĝoj kun niaj estraranoj mi ricevis kuraĝigon ke mi kandidatiĝu kiel prezidanto de IKEF. Sincere mi deziras fariĝi prezidanto de IKEF, al kiu mi aktivas de mia juneco ĝis nun nejuna komercisto. Pardonon ke mi ne tuj prenu ilian kuraĝigon pro tio ke mi opinias, ke la prezidanteco devas ĉiujare ĉeesti nian Jarkunvenon okaze de UK, ĉu ne? Pasinte mi planis kandidatiĝi ĉijare en nia JK okaze de UK 2011 Kopenhago. Sed laŭ nuna stato mi ne povas, ĉar ĉijare mi estas okupita de translokigo de mia loĝejo, preparo de geedzigo de mia filino, kaj pli grava evoluigo de mia negoco. Mi deziras kandidatiĝi kiel prezidanto en la jaro 2012 okaze de Jarkunveno kadre de UK en Vjetnamio. Se estus neceso, mi nun deziros fariĝi provizora prezidanto de IKEF. Mi havu grandan honoron servi al nia estraro kaj IKEF!

## Raporto pri la agado de IKEF dum 2010

**Retpaĝo kaj revuo**

Ne okazis grandaj ŝanĝoj en la retpaĝaro. Laŭ la statistiko estas proksimume kvin vizitantoj tage. Kvankam la rubriko 'Novaĵoj' estas principe je ĉies dispono, neniu uzas ĝin, nek reagas. Dum 2010 nur aperis unu numero de *La Merkato*. La enhavo estis minimuma.

**Google-grupo 'Komerco'**

La grupo havas 370 membrojn. Mezume estas 50 mesaĝoj monate, sed nur parto reale rilatas al komerco aŭ ekonomio. Eĉ en la 'realaj' mesaĝoj plej ofte mankas la bazaj informoj: nomo kaj adreso de la ofertanto, detaloj pri la ofertoj, referenco al retpaĝo. Ĉu *Xing* aŭ *Facebook* estas sufiĉe konataj de IKEF-anoj por povi funkcii kiel aldonaj komunikiloj?

**Membraro**

Malgraŭ la stagnado ĉe IKEF, sep novaj membroj aliĝis. Nur kelkaj metis foton kaj 'pri mi'-paĝon. Estas 123 membroj, sed tio estas teoria cifero, ĉar pro forfalo de deviga kotizo nepagintaj membroj ne plu estas eksigitaj.

**Estrarelektoj kaj ĝenerala kunveno**

Ne okazis estrarelektoj kaj la oficperiodo de la eksiĝantaj estraranoj estis silente plilongigita. Anstataŭ ĝenerala kunveno estis planata informkunveno dum la UK; ĝi ŝajne okazis sed ne ekzistas iu raporto pri ĝi.

**Terminologia laboro kaj eldonoj**

Nenio okazis. Ĉar ne estis reprezentado dum Universala Kongreso, ankaŭ ne estis venditaj eldonoj de IKEF.

**Financoj (vidu detalojn je p. 6)**

Enspezoj kaj elspezoj estas kvazaŭ egalaj. La ero 'ĝeneralaj kostoj' estas ĉefe la



kotizo de faka asocio ĉe UEA, kiu rajtigas je senpaga salono dum la UK. Kostoj de *La Merkato* falis, ĉar pasintjare nur aperis unu malgranda numero. La membrokotizoj duoniĝis; tio fakte estas bona rezulto, ĉar ne plu estas postulata kotizo. La sumo konsistas el antaŭpagitaj kotizoj, kotizoj de dumvivaj membroj, libervolaj kotizoj kaj kotizoj de la novaj aliĝintoj.

Dum la pasinta jaro apenaŭ okazis financaj transakcioj tra la perantoj. Tial iliaj nomoj ne plu estas menciataj.

Antaŭvideblas ke dum la venontaj jaroj la enspezoj estos minimumaj, sed IKEF disponas pri sufiĉe granda kapitalo por daŭre aktivi - kondiĉe ke ankaŭ estas homfortoj por tion realigi.

La revizoro, d-ro Polerani, ekzamenis la financajn dokumentojn kaj trovis ĉion en ordo.

Roland Rotsaert

## IKEF dum la Universala Kongreso en Kopenhago

Estis rezervita salono por duhora kunveno dum la UK. Konsiderante la malvig-lan situacion de la asocio, la daŭra manko de prezidanto, sekretario, ktp., nur povas esti neformala kunveno. (Legu ankaux la opinion de prof. Ooba je www.ikef.org.)

Nun mi atendas viajn reagojn kaj proponojn por la estonto de IKEF Mi aperi-gos ilin je www.ikef.org kaj ni diskutu pri ili dum la kongreso.

Roland Rotsaert

## Raporto pri IKEF-Ĉinio 2010

Posttagmeze de la 18a de septembro Yu Ximei, vicprezidanto de klubo de ĉinaj E-komercistoj, malfermis kaj prezidis la kunvenon, klarigante ke la ĉeestantoj diskutos pri ekonomio kaj kapitala cirkulado en ĉina kaj eksterlanda esperantu-joj kaj atingos komunajn konojn.

Matene de la 19a de septembro Zhao Chenghua, konstanta vicprezidanto de klubo de ĉinaj E-komercistoj, prezidis kunvenon kaj oni faris:

1. Subskribis intencajn komercajn interkonsentojn Da Vinci Importa kaj Eksporta Kompanio, Brazilo kaj Shuilian-a Limigita Kompanio pri Matracoj, Suzhou; Mixueer-a Teknologia Kompanio, Xiamen kaj Butiko Bela Interkonsento, Huangshi; Xien-a Komerca Kompanio Limigita, Xiamen kaj Zhiyuan-a Teknologia Entreprena Kompanio, Wuhan; Xien-a Komerca Kompanio Limigita, Xiamen kaj komerca sekcio de Guiyang-a E-asocio.

2. Ĉielismo, prezidanto de la klubo de ĉinaj E-komercistoj, anoncis, ke la venonta jarkunveno de ĉinaj E-komercistoj okazos en Ŝanhajo, de la 29a ĝis la 31a de oktobro 2011.

3. Ĉielismo faris resumon pri la atingoj de la ĉinaj E-komercistoj en la pasinta jaro kaj anoncis listojn de novaj konstantaj komitatanoj kaj komitatanoj.

Posttagmeze ĉeestantoj vizitis entreprenan bazon de esperantistoj kaj nacian minejan parkon, kaj vespere Huangshi-a E-asocio bankede akceptis la ĉeestantojn.

**Novaj membroj**

399. Goar Engeländer, Espenweg 15, 33102 Paderborn, Germanio, www.dametec.de
400. SIRKÓ Ilona, Mária utca 22, 1085 Budapeŝto, Hungario, katicazold@gmail.com
401. HOUNSOUNOU François, B.P. 226, Lokossa, Benino, www.bit.ly/revedenfants
402. XU Jie, Hans and His Dear Friends Co., Ltd, Rm 1319, 17F, Platinum Busi, Chengdu, Ĉinio, xujie8410@gmail.com
403. BERBEL Alain, 5 Square Ile Crozet, 35400 Saint-Malo, Francio, int.fmgrouplive.com
404. Hans-Peter BARTOS Gesundheits-Systeme, Schillerstr. 9, 06114 Halle, Germanio, www.bartos.info
406. Decostere Lucrèce, Sint Pietershof / La vasta mondo, Kraaibosstraat 6, 8552 Moen, Belgio, www.lavastamondo.be



IKEF - Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo - Spezokonto kaj bilanco (en eŭroj)

Spezokonto por la jaro 2010

| Kostoj | 2008 | 2009 | 2010 | Rimedoj | 2008 | 2009 | 2010 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Ĝeneralaj kostoj | 242,40 | 177,00 | 195,11 | Membrokotizoj | 568,80 | 583,15 | 288,04 |
| Elspezoj terminologia laboro | 0,00 | 0,00 | 0,00 | Donacoj | 0,00 | 0,00 | 9,00 |
| Kostoj de 'La Merkato' | 308,11 | 267,86 | 114,41 | Ricevita rento | 15,04 | 40,68 | 27,81 |
| Korespondado, telefonado, ktp. | 112,96 | 4,52 | 14,24 | Vendo eldonoj | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| | | | | Makleraĵo pro anoncoj Monato | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| Neta gajno de la jaro | 0,00 | 174,45 | 1,09 | Neta malgajno de la jaro | 79,63 | 0,00 | 0,00 |
| | 663,47 | 623,83 | 324,85 | | 663,47 | 623,83 | 324,85 |

Bilanco je 31 decembro 2010

| Aktivo | 2008 | 2009 | 2010 | Pasivo | 2008 | 2009 | 2010 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Kaso | 190,93 | 226,40 | 102,04 | Kotizoj antaŭpagitaj | 386,04 | 303,26 | 183,72 |
| Poŝtĉekkonto belga | 0,00 | 0,00 | 0,00 | Kapitalo dumvivaj membroj* | 1.392,88 | 1.322,88 | 1.252,88 |
| Konto ĉe Universala E-Asocio | 851,35 | 904,35 | 786,85 | Subtena Fondaĵo | 20,00 | 20,00 | 20,00 |
| Konto ĉe Flandra E-Ligo | 1.347,58 | 1.295,10 | 1.340,10 | Kurantaj kontoj** | 68,88 | 64,96 | 64,96 |
| Ŝparkonto ĉe Flandra E-Ligo | 1.595,37 | 1.636,05 | 1.663,86 | Transira konto | 0,00 | 0,00 | 0,00 |
| Kurantaj kontoj | 28,92 | 0,00 | 0,00 | | | | |
| Konto ĉe *Moneybookers* | 49,40 | 19,40 | 0,00 | | | | |
| | | | | Kapitalo | 2.195,75 | 2.370,20 | 2.371,29 |
| | 4.063,55 | 4.081,30 | 3.892,85 | | 4.063,55 | 4.081,30 | 3.892,85 |

| | 2008 | 2009 | 2010 |
|---|---|---|---|
| kapitalo | 2275,38 | 2195,75 | 2370,20 |
| rezulto | -79,63 | 174,45 | 1,09 |
| nete | 2.195,75 | 2.370,20 | 2.371,29 |

*Dumvivaj membroj: Shang, Li Renzhi, Wang, Pirlot, Huang, Zheng, Witdoeckt, Liu, Alfred Kobina Arthur, Hornecker

**Kurantaj kontoj fine de 2010 (pasive): Gilbert (48,88), Wang (16,08)

**Likelemba - la afrika formo de tontino** (bazita sur http://eo.wikipedia.org/wiki/Tontino)

Laŭ la epoko kaj laŭ la regiono tontino povas havi tute malsamajn ecojn. Komunaj al ĉiaj skemoj estas la hazardaj kaj loteriaj aspektoj.

**Origino kaj frua apliko**

Oni atribuas la principon de tontino al la itala financisto Lorenzo Tonti (1630 - 1695). Pluraj personoj deponas egalan monsumon en la tontino. Se unu persono mortas, ties parto estas dividita inter la pluvivantaj membroj. La lasta pluvivanto ricevas la tutan sumon. Variaĵo estas ke la ŝtato pagas pension al la membroj kaj ke ĝi ricevas la tutan kapitalon post la morto de la lasta membro.

Dum la deksepa kaj dekoka jarcentoj tontinoj estis kreitaj por financi ŝtatajn elspezojn (ekzemple militojn) kaj privatajn konstruprojektojn. Ĉar estis malavantaĝoj kaj misuzoj kaj pro alveno de novaj investoteknikoj, la uzo de tontinoj maloftiĝis.

**Nuntempa praktiko**

Nuntempaj aplikoj (kondiĉe ke la landa leĝo permesas) estas ĉe religiaj komunumoj (por eviti ke la havaĵo de la komunumo dispeciĝas) kaj ĉe negedziĝintaj personoj (por garantii ke kune aĉetita proprietaĵo post la morto de unu partnero iĝas plena posedaĵo de la pluvivanta partnero).

**Apliko en Okcidentafriko**

La origine eŭropdevena termino ankaŭ estas konata en Okcidentafriko; ĝi korespondas kun la vorto *likelemba* el lingala lingvo. Estas du ĉefaj proceduroj: rotacia kaj akumula.

*Rotacia tontino*

Partoprenantoj de tontino devigas sin je fiksaj datoj pagi antaŭe interkonsentitan sumon. Je ĉiu pago unu el la partoprenantoj estas indikita kiel sola ricevanto de la tuta ricevita sumo. Eblas lotumi aŭ antaŭe interkonsenti pri la vicordo de la favoratoj. Por la unua favorato la tontino aspektas al kredito aŭ mikrokredito: li tuj ricevas sufiĉe grandan sumon kiu ebligas al li komenci komercon aŭ fari gravan investon. Por la lasta favorato ĝi estas ŝparilo.



La ciklo finiĝas kiam ĉiu partoprenanto unu fojon estis favorato. Kutime tuj estas kreata nova tontino.

Rotacia tontino ankaŭ estas uzata ĉe afrikdevenaj migrantoj en Francio.

*Akumula tontino*

Ĉe akumula tontino la sumoj ne estas redonitaj al la membroj, sed restas komunaj ĝis kiam estas decidite dividi la kapitalon, proporcie al la kontribuoj de la membroj.

Intertempe la mono estas investita laŭ la maniero kaj la kondiĉoj interkonsentitaj inter la membroj. Plejofte ĝi estas disponigita kiel mallongtempa kredito al unu aŭ pluraj membroj. Ĉar la postulata rento estas alta, en la momento de la disdivido de la tontino la membroj ricevas kapitalon sufiĉe grandan, uzeblan por ekzemple familia festo aŭ lernejaj kostoj.

La proceduro utilas kaj al investantoj kaj al kreditprenantoj. Eblas aldonaj asekursimilaj servoj, ekzemple pago en kazo de malsano aŭ morto.

**Similaj skemoj**

Evidentiĝis ke similaj financaj transakcioj ekzistas ĉie en la mondo. En la anglalingva faka literaturo ili estas nomataj ROSCA (rotating savings and credit association, rotacia ŝpar- kaj kreditasocio) kaj ASCA (accumulating savings and credit association, akumula ŝpar- kaj kreditasocio).

**Literaturo (franclingva)**


* Christian KAKULE KAPARAY: Finance populaire et développement durable en Afrique au Sud du Sahara : application à la région Nord-Est de la République démocratique du Congo. Louvain-la-Neuve, UCL - Institut d'études du développement, 2006
* Abdoulaye KANE: Tontines, caisses de solidarité et banquiers ambulants - Univers des pratiques financières informelles en Afrique. Paris, l’Harmattan, 2010
* Dominique KOUNKOU: Pour une renaissance de la tontine. Paris, l’Harmattan, 2008